

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO- INSTITUTO

Nr 50 decembro 2003

Adreso: p/o Bardhyl Selimi Rr. Maliq Muço P.50 A.3 Tiranë Albanio

Telefonoj: +355 4 241272 (Vasil, prezidanto); +355 4 238 558; ++355 68 25 80 758 (Bardhyl, sekretario); +355 4 363360 (Rita, kasistino)

Rete: pistolii@email.com (Vasil Pistoli); selimib@albmail.com (Bardhyl Selimi); adoci@gmx.de (Artur Doçi); shhasani@albmail.com (Shaban Hasani); hamotto@aul.com.al (Martha Otto); beqirajs@hotmail.com (Saimir Beqiraj); matildasokoli@yahoo.com (Matilda Sokoli); a_myrazi@yahoo.com (Ariel Myrazi); sambeg2000@yahoo.com (Saimir Begollari); dpermeti@amc.al (Rita Përmeti); dorian77@hotmail.com (Dorian Kodra); mgumeni@lincoln.org.al (Jon Gumeni); hysaerald@yahoo.it (Erald Hysa); ereid@wp.pl (Ereid Dhimitri); dritanxhindole@hotmail.com (Dritan Xhindole); ervincanga@yahoo.com

Retpag'o : <http://www.esperantio.tk>

La enhavo de tiu c'i numero

ILEI kaj NI- Forpasis Boo Mee- skribas Mauro la Torre

Alvoko de Stefan MacGill

AIS kaj NI -Prof. Quednau dankas

UEA kaj ni- Alvoko de prezidanto Renato Corsetti

Eventoj ene de Albana Esperanto- Instituto- Vasil Pistoli farig'is 80-jara-salutparolo

Gratuloj de samideanoj

Lernokursoj- Novaj lernokursoj

Ni dankas..-

Propagando pri kaj por Esperanto- C'u Albert Ajns'aj favoris Esperanton/

Opinio de diplomato pri Esperanto

Kiel Esperanto bezonatas al verduloj

Martha –virino de Esperanto

Novaj'oj el Albanio- La Balkana "Nobel-premio"

La solvita enigmo

El agado de Transnacia Radikala Partio- Raportoj kaj anoncoj de Ranieri Clerici

Politiko- Nelogikaj protestoj

El la leteroj- Hartmut Fillmann

Projekto de Mariana

Distra Angulo- Iluziaj'oj

ILEI kaj Ni

• Forpasis Boo Mee, la kasistino de ILEI

Karaj gekolegoj, eksciinte antaŭ kelkaj tagoj pri la morto de _BooMee_ Kim-LindBlom, ankoraŭ mi ne sukcesas alkitimigi je la ideo de ŝia malapero: do mi skribas kvazaŭ ŝi troviĝus inter ni. Ŝi eniris la estraron de ILEI, kia respondeculo pri la financoj de la

asocio, en 1999 okaze de nia Internacia konferenco en Karlovivaro. Ekde tiam s[^]i ludis gravan rolon en la konduko de nia organizo, malric[^]a kaj malfortika organizo. Aparte dum la longa periodo, kiam ni ne havis funkciantan sekretarion, ofte s[^]i vole/nevole samtempe plenumis ambau[^] tiujn rolojn (kasistan kaj sekretariuman). Dum la lasta somero en Svedujo s[^]in strec[^]is pluraj samtempaj taskoj, kiel la arang[^]o de la Antau[^]kongreso de UK en Stokholmo, la pretigoj por la ILEI-konferenco en Orestrando (kun multaj g[^]iaj implicoj), kaj aliaj faroj, kiujn mi ne sufic[^]e konas au[^] memoras por mencii c[^]i tie, sed ja de s[^]i plenumitaj. Dum la veturado de Stokholmo al Gotenburgo mi havis la okazon iom sidi apud s[^]i en la buso, kiam evidente s[^]i estis tre laca kaj strec[^]ita pro la subtenataj responsoj. En tiu mallonga babilado mi ekkonis diversajn s[^]iajn vivofazojn, kiujn mi ec[^] ne supozis: pri s[^]ia junula esperantista agado kaj unua familio en Seulo, pri la intelekta influo de s[^]ia patro, pri s[^]ia forlaso de sia lando por eklabori en Kanado, konservante nur kelkajn ligfadenojn je la E-movado, pri la revekig[^]o de s[^]ia E-agado kaj translokig[^]o al Svedujo kun nova familio kaj profesio, ... g[^]is la hodiau[^]a avineco. Dum kelkaj jaroj ni estis precipe aferece korespondintaj pri la administraj problemoj de ILEI, mankante tempo por personaj kaj profesiaj inters[^]ang[^]oj. Male, okaze de tiu busa babilado, ni povis kompari niajn spertojn pri la lingva kaj kultura edukig[^]o de s[^]ia nepo (korea patrino kaj sveda patro)

kun tiu de mia filineto (denaske itale kaj Esperante parolanta), kiu ankau[^] sidis en la buso. Au[^]dante pri s[^]ia nuna profesia laboro, mi malkovris pri s[^]ia c[^]iutaga kurado de unu lernejo al alia en la Stokholma provinco, kie s[^]i intruadis paperfaldadon kaj librotenadon. Tiam mia edzino, apude sidanta, demandis al s[^]i pri la edukaj _celoj_ de la Paperfalda instruado en tiuj bazaj lernejoj: Bumi senhezite respondis: KONCENTRIG[^]O, AKURATECO, PACIENCO. Tiam ni triope samopiniis ke temas pri plej gravaj mankoj en nia nuntempa infanaro, preter la landlimoj ...Mi ankau[^] konfesu ke dum c[^]i tiuj kunlaboraj jaroj en la sama estrara teamo, ne c[^]iam ni sukcesis interkomprenig[^]i pro malsamaj kulturaj radikoj. Kelkfoje mi ekpensis c[^]u sufic[^]as lingvo internacia, kiam la kulturaj modeloj, pensaj kaj esprimaj manieroj tre malproksimas, kiel inter azia fora oriento kaj eu[^]ropa sudo . Sed la sperto estis kreskiga, kaj ni povis ec[^] komunciele kontribui al la konstruado de la Proverbejo en la Interkultura Kvazau[^]Lernejo "Tibor Sekelj". . . .Jen per c[^]i tiuj kelkaj pensoj mi volas modeste kontribui al memorigo pri Bumi, kies serioza kaj malavara laborado meritas diskonigon. Se aliaj listanoj havas aliajn similajn personajn kaj profesiajn memoraj[^]ojn, bonvolu disponigi al c[^]i tiu diskutejo, lau[^] la devizo: ne nur floroj sed bonfaraj ekzemploj ...
malg[^]oje, **Mau[^]ro La Torre ILEI-prezidinto**

Alvoko de Stefan MacGill

- Al:

Sekciestroj, Reprezentantoj, Estraro, Redaktoroj

Karaj, Kiel promesite, jen la teksto de la pli ampleksa varbilo kiun vi ricevos kun IPR4. Poste ni indikos al vi kiel vidi ilin enpagxigite kaj mendi kvantojn.

Cxi tio ne estas la formala laborplano de la ligo, sed gxi provizas bonan resumon de la farota/farata laboro. Do, jen la varbilo simplekste, kun supersignoj perditaj.

==== VARBILO, p 1 =====

ilei [simbolo]

Ni bezonas unu la alian

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) estas la cefa renkonto-punkto por instruistoj kaj edukistoj. Gi havas operaciajn rilatojn kun Unesko kaj estas unu el nur ses aligintaj fakaj asocioj de Universala Esperanto-Asocio. ILEI havas sekciojn en pli ol 30 landoj kaj membrojn en pli ol 45.

Kiuj bonvenas kaj bezonatas en ILEI?

=====

- o Praktikantaj instruistoj nuntempe instruantaj Esperanton.
- o Instruistoj de lingvoj au aliaj fakoj kiuj volas intersangi spertojn kun alilingvaj kolegoj en Esperanto.
- o Junuloj au aliaj volantaj (au devigataj) gvidi kursojn en arangoj, kluboj au per la reto.
- o Personoj kun sperto en trejnado de instruistoj, flego de ekzamen-sistemoj, reta kaj distanca lernado kaj similaj kampoj.
- o Instruistoj kaj -antoj ec se nuntempe ne aktive instruantaj la lingvon.
- o Subtenantoj de la instruado de Esperanto kaj interkultura edukado.

Kio ce ILEI povas bonveni/konveni al vi?

=====

- o Ilustrita revuo Internacia Pedagogia Revuo (IPR) aperanta kun 40-pagoj kvarfoje jare, prezentante nivelajn fakajn artikolojn kaj ligajn novaĵojn. Gia livero estas inkluzivita en la membreco.
- o Ciujara internacia konferenco kun fakaj prelegoj en kolegeca etoso.
- o Abonebla revuo Juna amiko (4-foje jare, 28-paga) kun allogaj legajoj en simpla lingvajo por lernejoj kaj komencantoj.
- o Aliro al hejmpagoj de ILEI, IPR, Interkulturo kaj multaj aliaj.
- o Partopreno en la arangoj kaj servoj de niaj landaj sekcioj.

===== Varbilo, paghoj 2-3-4 =====

La ligo havas estraron, komitaton kaj laborplanon. Sur la sekvaj pagoj ni skizas niajn prioritatojn sur cefaj laborkampoj. Via membreco helpas al ni realigi ci tiujn planojn. Via aktiva kunlaboro en sekcio au por la internacia ILEI estas bona kaj bezona.

Interna fortigo

=====

- o Firmigi kontaktojn kun sekcioj, fondante novajn kie eble.
- o Kontakti pli regule komitatanojn kaj plekti ilin en projektojn.
- o Sekurigi la financon bazon de la Ligo, i.a. per ne-kotizaj enspezoj kaj pli proksima kost-kontrolo de niaj kontinuaj agadoj.

Konferencoj

=====

- o Pliricigi la ILEI-konferencojn per pli granda program-vario.
- o Fortigi la fakan programon kun aktiva partopreno de konferencanoj.
- o Malfermi la konferencojn al neesperantistaj eduk-fakuloj.
- o Altiri konferencanojn de diversaj agoj kaj mondpartoj.

Retprojektoj

=====

- o Starigi novan pagaron por ILEI (www.ikso.net/ilei)
- o Krei retbultenon por komencantoj (www.lernu.net/ja)

- o Daurigi laboron pri la mult-lingva kursejo "lernu!" (www.lernu.net)
 - o Aldoni la Ligon al la evoluigata "Reta Oficejo" (www.ikso.net/ro)
 - o Kunlabori kun la projekto Edukado.net (www.edukado.net)
 - o Plibonigi la pagaron de Interkulturo (www.interkulturo.net)
 - o Starigi interaktivan ejon (vikion) por ILEI (www.ikso.net/ilei/vikio)
- Interkulturo kaj aliaj projektoj

- =====
- o Disvastigi uzadon de la reta projekto Interkulturo
 - o Evoluigi manierojn taksu la efikojn de la projekto.
 - o Subteni kaj utiligi aliajn edukajn E-projektojn
 - o Evoluigi novajn edukajn kaj eduksciencajn E-projektojn

Junulara agado

- =====
- o Verki manlibron por junaj instruemuloj.
 - o Organizi instrutrejnadon dum TEJO-arangoj.
 - o Evoluigi ekzamsistemon pli konvena por uzo en junularaj rondoj.
 - o Teni proksiman kontakton kun TEJO.

Eldonado

- =====
- o Daurigi la kreskantan kvaliton - enhavan, aspekton - de IPR.
 - o Sekurigi la financon bazon por nia lerneja revuo Juna amiko.
 - o Diskutigi strategion por ĝia hibrida eldonado - papera kaj reta.
 - o Reverki kaj reeldoni kajeron 1 de la lernila serio Tendaraj tagoj.
 - o Sekvi aliajn eldonajn eblojn kaj bezonojn, inkluzive de reta eldonado.

Informado

- =====
- o Malfermi vojojn pli automate ret-sendi ILEI informojn al gazetoj, E-centroj, Landaj kaj Fakaj Asocioj, retaj diskut-rondoj ktp.

Lerneja agado

- =====
- o Subteni interesajn iniciatojn en la instrua kampo - speciale pri lerneja agado, instrukapablo kaj ekzamenoj.
 - o Observi kaj kompili informojn pri la stato kaj kondiĉoj de E-instruado.
 - o Kunorganizi kun TEJO E-kurson en 2004 dum OkSEJT (arango antaŭ la IJK) laueble kun seminario pri instrukapablo.
 - o Kunlabori en la projekto "flugiloj" por krei pli facilan sistemon de instrukapablo, kaj por kunverko de metodikaj libroj.

Scienca kaj Universitata Agado

- =====
- o Aktualigi kaj disponigi informojn pri scienca esplorado pri Esperanto-lern-rilataj temoj (lingva lernfaciligo, interkultura edukado, ..) kaj aparte pri uzo de Esperanto en la instrusciencia esplorado.
 - o Diskonigi informojn pri universitata instruado de Esperantologio kaj Interlingviko, kaj krome pri peresperanta lekciado.
 - o Kunlabori kun aliaj organizoj (AIS, Fakaj Asocioj, CED, ESF, IEM, CDELI, ...) en didaktikaj kaj esploraj projektoj

- o Evoluigi datumbazon pri la roloj de la Internacia Lingvo en la instru-superaĵoj medioj (konferencoj, seminarioj, kursoj, periodaĵoj, ktp.).
- o Konstrui telebilibroterojn pri pedagogia eksperimentado rilate Esperanton kaj pri e-lingvaj eseoj en la instrusciencaĵoj terenoj.
- o Funkciigi laborgrupon pri terminologio en la instruaj kampoj.

Eksteraj rilatoj

=====

- o Plifortigi kunlaboron kun aliaj institucioj de la E-komunumo
- o Enkonduki novajn elementojn en la ILEI-programojn en UK
- o Proponi ILEI-programojn al IJK kaj regionaj E-kongresoj
- o Daurigi kaj utiligi la rilatojn kun Unesko, FIPLV kaj similaj organizoj.
- o Evoluigi kunlaboron kun neesperantistaj institucioj kaj fondaĵoj en la kultura kaj eduka kampoj

Vizitu niajn hejmpaĝojn kaj kontakti niajn sekciojn por pli da informoj.

ILEI: ? IPR: ? Juna amiko: ?

[Blanka spaco por sekciaj kontakt-adresoj, informoj.]

Anoncu vin per la respondilo sur aparta varbilo.

Vi bezonas niajn internaciecon kaj servojn. Ni bezonas viajn ideojn, sperton, energion kaj kunlaboron. Kune ni bonigu la nivelon de Esperanto-instruado kaj la praktikan utilecon de la lingvo por edukistoj.

=====FINO=====

Kore salutas, **Stefan ILEI**, Eldonado

AIS kaj NI

Prof. Quednau dankas albanajn studentojn

Karaj amikoj el Albanio,

Post kiam ni revenis de tuta sinsekvo de diversaj konferencoj, ni havas finfine la okazon elkore danki al vi pro la floroj kaj la belaj donacoj, kiujn vi lasis por ni en nia hotelo antaŭ via forveturo el Bulgario - kaj denove gratulas pro via sukceso dum la bulgara Prov-SUS. Viaj nomoj estos inter la unuaj en la registro de sukcesaj AIS-kandidatoj, kiu estos gardata en la universitato de Burgas.

La fiera simbolo de Albanio ankoraŭ troviĝas en nia logejo - eble ĝi baldau translokiĝas al la universitato al pli digna loko. Ni tre esperas, ke vi baldau sukcesos fondi la asocion AIS-Albanio. Por faciligi al vi la taskon, mi aldonas kile modelon la statuton de AIS-Bulgario. Kompreneble vi povas s'ang'i ĝin laŭ la kutimoj kaj leg'oj de Albanio. Elkore salutas, **Dieter Quednau kaj Alicja Lewanderska-Quednau**

- Karaj Albanaj kolegoj- eksstudentoj kaj anoj de AIS.

Ni dankas al vi pro leteroj kaj salutas vin cxiujn. Ni longe jam atendas ke vi organizu AIS Albana- Filion kaj Asocion -tio estas tre grava kaj bezonata.

La afero nun jxus ekhavas la novan valoron cxar oni provas denove reveni al planoj de Ligo de Nacioj el la jaro 1922. Poste nur en ne multaj landoj oni enkondukis Esperanton en lernejoj. Nun oni bezonas ne nur E-turisman agadon sed strikte la instru-specialistojn, cxar estas necesa pli granda kaj cxiam pli junaj fortaj grupoj. 2/ Skribu pli pri viaj estontaj planoj- enmetu AIS-arangxo en programo kaj pensu pri eniro en internaciaj kontaktoj. 3/ Ni ankorauxfoje dankas al vi cxuij pro via pena kaj efika laboro kaj pro la sukceso en studado.

Bv devigu du kolegojn kiuj devas iom ankoraux fari, ke ili kontaktigxu kun mi kaj raportu pli progreso, helpu al ili- se ili estas bonaj en pola lingvo (kaj gxi ne estas facila) ili povas ankaux atingi perfektecon en Esperanto. Ankaux pluraj de vi devas eklerni publike pli kuragxe paroli. Tio ankaux estas necesa por estonta sukceso. 4/ Mi tre petas kolektu de cxuij 8 personoj, kiuj estis en Karlovo sur diskedoj ilian laboron, kaj aux sendu gxin al mia adreso aux al mia edzo kun samtempa sendado rete , pli certe al adreso de HD Quednau 5/Kio estas kun faritaj fotoj?

elkoraj salutoj **Alicja Lewanderska-Quednau**

UEA kaj Ni

Alvoko de prezidanto Renato Corsetti

temo: Re: Fw: Avo Frosto reago

dato: Fri, 21 Nov 2003 22:16:58 -0500

de: Normand Fleury <esperanto@sympatico.ca>

Pasintjare ni sukcesis ke la Kanada Pos^{ta} Servo oficiale aldonu esperanton inter la lingvoj uzataj de Avo Frosto (JulAvo). Bedau^rinde, nur kelkaj infanoj skribis al li en E. Malgrau^t tio, ili konsentis denove uzi E. kaj 3 leteroj estis tradukitaj al E. tiel ke Avo Frosto pretas respondi al la infanoj de la mondo. Temas pri vere bele presitaj leteroj, koloraj eldonitaj de la Kanada Pos^{ta} Servo. Ili do tre plac^{as} al infanoj (kaj al gepatroj). Nia peto estas ke vi diskonigu la aferon. Ni antau^e multe dankas vin.

Normand Fleury, prezidanto de ESK

KOMUNIKAJHO DE LA ESPERANTO-SOCIETO KEBEKIA POR TUJA DISVASTIGO

SKRIBU AL AVO FROSTO, LI RESPONDOS... ANKAU EN ESPERANTO!
MONTREALO, KEBEKIO, KANADO, la 18an de novembro 2003. - Kristnasko 2003 alvenas kaj kiel chiu jare, miloj da infanoj el Kanado kaj la tuta mondo skribos al Avo Frosto. Tradicie en Kanado infanoj kiuj skribas al li en la franca, angla au en dudeko da aliaj lingvoj ricevas respondon el la norda poluso. Denove chiu jare la geinfanoj kiuj skribos al Avo Frosto ricevos respondon en Esperanto.

En 2001, la Esperanto-Societo Kebekia (ESK) traktis kun la Kanada Poshta Servo sugestante la uzon de Esperanto por komuniki kun la esperanlingvaj infanoj de la mondo. La Kanada Poshta Servo jesis al la propono de ESK kaj

ekde Kristnasko 2002, Esperanto estos inter la korespondaj lingvoj uzataj de Avo Frosto kaj siaj helpantoj, la volontuloj de la Kanada Poshta Servo por subteni alfabetigon.

La Esperanto-Societo Kebekia invitas chiujn esperantistojn, junaj kaj junkoraj, malkovri tiun kristnaskan tradicion skribi al Avo Frosto. Simple sendu manskribitan leteron al la sekva adreso:

AVO FROSTO

NORDA POLUSO

HOH OHO KANADO - CANADA

Avo Frosto preferas manskribitajn leterojn, ech se skribitaj de etaj manoj kiuj lernas skribi. Ne forgesu klare skribi vian nomon kaj adreson por certigi ricevon de respondo.

Ni ankau invitas la esperantistojn kaj la esperantistajn organizojn tra la mondo varbi pri tio tiel ke la esperantlingvaj infanoj povos skribi al Avo Frosto chi jare.

Ni dankas antaue se vi povus sendi al ni ekzempleron de revuo, kie la informo aperis.

Normand Fleury Prezidanto Esperanto-Societo Kebekia

6358, rue de Bordeaux, Montrealo, Kebekio, Kanado, H2G 2R8

P.S. Jes ja la adreso validas. La speciala pos^kodo HOH OHO estas rezervita al Avo Frosto c^ar estas ja konata afero ke li ofte forte gorg^e ridas al la infanoj

Renato Corsetti, via del Castello, 1, IT-00036 Palestrina,
Italujo, <renato@kiesperanto.org>

Eventoj ene de Albana Esperanto-Instituto

Vasil Pistoli farig'is 80 jara !

Salutparlo okaze de 80 jarig'o de Vasil Pistoli

Celebrante la 80an jubileon de profesoro Vasil Pistoli, mi deziras kompletigi iom ties vivopriskribon. Temas pri ties agado por la disvastig'o de la helplingvo internacia Esperanto ankau' Albanion. Mi estas lia intima kunlaboranto en tiu agado ekde pli ol 40 jaroj. Komence mi estis ano de lia lernokurso malfermita de li au'tune 1961 kune kun ing. C'efo Fico c'e la eksa kulturdomo "Ali Kelmendi" en Tirana. Mi dau'risgis la kunlaboron pluen, aparte post la jaro 1990, kiam la neregistaraj organizaj'oj akiris la rajton de civitaneco ankau' en Albanio. Kvankam c'irkau' 20 jaroj pli juna ol li, mi sentis min c'e profesoro kiel kamaradon kaj amikon. Mi estas aprecinta multe c'e li, unuavice la modestecon, due lian ric'an kaj multflankan kulturon, neestingeblian soifon por scioj sur c'iuuj homaj kampoj, ne nur en sia malvasta specialeco, sed ankau' en filozofio, religio, historio, internaciaj rilatoj, kio estas klare esprimita en lia kontribuo kaj laboro por disvastig'o de Esperanto. Tiu lasta kiel sciite, estas tre nobla agado, c'ar g'i strebas la

bonkomprenemon inter la diversaj popoloj sur demokratiaj bazoj, ekster kiu ajn nacia diskriminacio kaj malegaleco, kiu konservas la naciajn lingvojn kaj kulturojn.

C'ekape de la Albana esperantista Ligo dum kelkaj jaroj kaj nun direktoro de la Albana Esperanto-Instituto, profesoro Vasil sin montris tre aktiva en la kursogvdiado, lernolibra kaj metodika kompilado por albanoj, en tardukado de verkoj kaj libroj el esperanto al la Albana kaj el la Albana al Esperanto, en propagando de la esperantista movado mem per la gazetaro kaj elektronika medio, en renkontig'oj kun fremdaj esperantistoj. Li estas esplorinta ankaŭ la spurojn de la esperantista movado en Albanio komencig'inta en Shkoder almenau' ekde la jaro 1907 kun Lazer Shantoja, Cuk Simoni, fratoj Koliqi, Mark Kakariqi ka, sed renkontitaj ankaŭ en la aliaj regionoj, kiel en Gjirokaster kun C'efo Fico, en Marbordo kun Jamko Pali, en Tiranw kun dr. Hamdi Sulçebe kaj alie.

La jaro 1993 notis la starig'on de amasaj lernokursoj de Esperanto, komence en universitato, en fakultato de Historio kaj Filologio, kie je la finig'o de la lernokurso, ekzamenig'is 22 gestudentoj, poste en la mezlernejo de Fremdlingvoj kaj Pedagogia Mezlernejo en Tirana, en aliaj mezlernejoj kaj elementaj okjarlernejoj, en Tirana kaj en la distriktoj. Mi memoras emociplene tiujn tagojn, pluve kaj sune kiam profesoro 70 jara nelacig'ema, alvenis pide kaj g'ustatempe en la halojn de Fakultato en Tirana au' de la mezlernejo por lekci pri Esperanto. En Fremdlingva Fakultato li ec' okazigis disputon pri la antaŭ'ecoj de Esperanto kompare al la aliaj tiel nomataj "grandaj lingvoj", kiuj hodiaŭ prezentig'as kiel "internaciaj", sed envere ili ne ludas tiun rolon, kontraŭ'e ili nur domag'as la naciajn kulturojn aparte de la malgrandaj popoloj, forrabas al centmilionoj da homoj, aparte al gejunuloj, multjaran tempoperiodon tre valoran por ke ili asimilig'u fus'fus'e, anstataŭ ke ili utiligu tiun tempon por ke profundig'u en siaj studataj specialecoj, kreas privilegiaj'ojn por kelkcent procentoj de la monda log'antaro malfavore al la cetera plimulto, kaj kio estas malplejbona, ne solvas la problemon de la libera, facila kaj demokratia internacia komunikig'o

Infan-soldato

Estas jam c'irkau' 500 gestudentoj kiuj ekzamenig'intaj kaj ricevintaj la konfirmon de profesoro Vasil Pistoli per signo sur iliaj certigiloj akiritaj pri la elementa nivelo de Esperanto.

Aktuale, profesoro Vasil estas laborante por finkompili la grandan vortaron albana-esperanta, kiu pliric'igos la fonduson de la vortaroj enmonde kaj helpas notinde la enlanda Esperantista movado.

Profesoro Vasil estas helpinte sufiĉ'e multe ankaŭ por kvalifikig'o kaj trejnig'o de novaj kadroj por instruado de Esperanto. Tiel, post la jaro 1997 Instituto gvidata de sinjoro Vasil entreprenis grandan akcion: venigon de dekoj da albanaj gestudentoj al Pollando por ekstudi pri Turismo kaj Internacia Kulturo, surbaze kiel laborlingvon g'uste Esperanton. Nun pli ol 20 el ili estas jam bakalau'rig'intaj kaj ec' du ankaŭ magistrataj de Internacia Akademio de Sciencoj de San Marino kun kiu nia Instituto kunlaboras. Sendube tiuj c'i bakalau'rig'intaj studentoj estos la venontaj aktivuloj de la esperantista movado en Albanio, certe sur pli alta kultura nivelo, ol tiu de la maljuna generacio kiu tamen au'dacis kaj sakrificis elspezante sian libertempon por tiel nobla idealo kia ja estas esperantista idealo.

Bardhyl Selimi, sekretario de la Albana esperanto Instituto

- **Radojica Petrovic'**, prezidanto de ILEI la unua sendis rekte al Vasil elkoran gratulon
-

Kiel esperantisto kiu vizitis vian belan kaj interesan landon antaŭ kelkaj jaroj (kadre de la internacia grupo gvidata de Bardhyl) mi g^ojis au^odi pri via datreveno de naskig^o- 80 jarojn- kaj mi kun g^ojo gratulas vin.

Mi deziras al vi longan vivo, sanon kaj prosperon.

Amike salutas, **Josef S^oemer**, Israelo

•

bonvolu permesi al mi okaze de via 80-jarigxo sendi al vi la plej varmajn bondezirojn nome de la tutmonda esperantistaro.

Via vivo kaj via agado por Esperanto estas ekzemplodona por la junaj esperantistoj, kaj mi certas ke ankoraux dum jaroj vi donos al la Esperanto-movado en Albanujo vian sagxon kaj vian impulson.

Mi ne skribas pli longe por ne senvalorigi la cxefan ideon de cxi tiu mesagxo: Multajn bondezirojn nome de la tutmondaj esperantistoj!

Tre amike **Renato Corsetti** - prezidanto de Universala Esperanto-Asocio

•

Gratulojn kaj la plej bondezirojn al vi okaze de via okdekjarigxo. Mi renkontis vin en 2001 kiam grupo de Esperantistoj, gviditaj de s-ro Bardhyl Selimi, vizitis Albanion post la UK-o en Kroatio. Mi rememoras, ke vi alvenis saluti nian grupon. Kaj poste, dum la lastaj pli ol du jaroj mi multfoje trovis vian nomon kiel

kontribuanton al la Bulteno de la Albana esperanto-Instituto, kiun bonkore sendis al mi Bardhyl. Hodiaux mi revenis hejmen post kvar-semajna vojaĝo al Kanado kaj la okcidentaj usonaj sxtatoj. Mi jxus rimarkis anoncon pri via naskigxtago. Cxi tie estas la 24-a de oktobro. Do jam estas la 25a de oktobro en via lando, Bulgario. Multe placxas al mi saluti vin je via naskigxtago. Estu por vi multaj aliaj jaroj de placxa laboro por kaj pri Esperanto en via lando.

Sincere, **Henry Studer Davis**, California Usono

•

okaze de via 80 jara datreveno, mi gxojas povi saluti kaj gratuli. Multajn jarojn en sano kaj felicxo sincere deziras, **Agnes Geelen**, Belgio

• **Martha Otto** sendis varman gratulleteron.

• **Gjergji Gusho** telefonis tagon de 80-jarig^o, bonau^o gurante Vasil.

Lernokursoj –

• **Nova lernokurso**

Frunovembre 2003 komencig^ois nova lernokurso c^oe la privata turisma mezlernejo “HOTURS”, Tirana. La kurson partoprenos 9 gelernantoj 15 jaraj. 20 lecionoj kaj la plena vortaro albana-esperanta kaj esperanta-albana estas enigita en komputiloj de c^oiu lernanto kaj ili povas ankau^o studi memstare. Oni planas uzi ankau^o au^odo diskedojn kaj du filmojn produktitaj por la lernokurso, nome “Pasporto al la tuta mondo” kaj “Mazi emn Gondolando”.

• Same en la tutncia hotelumada kaj turisma mezlernejo en c^oefurbo kun 950 gelernantoj oni anoncis la malfermon de nova lernokurso de Es[peranto. Parto de gelernanto petis registri sur iliaj diskedoj la lecionaron kaj vortaron kaj poste ili mem

studi. Printempe oni planas starigi ekzamenkomisionon por estimi la sciojn akiritajn de gelernantoj.

Ni dankas...

- S-ron Jacques Tuinder pro sinsekvaj pakaj'oj da paperaj'oj, libroj kaj aliaj uti;laj'oj por nia Instituto, inkluzive komputilajn diskedojn.

- S-ron Tpon Verwoerd pro bonega eldonaj'o de la libro "Infan-soldato" kie aperas versaj'o de nederlanda knabino Dominique Binkman, 12 jara en nederlanda kaj plutaj mondaj lingvoj, inkluzive la albanan. Jen la teksto en esperanto:

Batali li devas	Rajtojn preferas	For la pafilo!
Rajtojn ne ricevas	Pafilon rifuzas	Ek al la vivo
Pafilon li uzas	Refoje plurfoje	Refoje nau'foje!
Refoje, refoje	C'u rajtojn akiri?	
Li batali ne volas	El la kampo foriri?	

Propagando pri kaj por Esperanto

• C'u Albert Ajns'tajn favoris al Esperanto?

Eble ni chiuj havis la okazon iam legi, ke Albert Einstein diris au skribis : "Esperanto estas la plej bona solvo de la ideo de internacia lingvo" . Bedaurinde, mi mem kontribuis al disvastigo de tiu falsajho, i.a. en la unua eldono de la biografio de Zamenhof "L'homme qui a défié Babel" eldonita che Ramsay en 1995. Tio estas forigita en la dua eldono aperinta che L'Harmattan en 2001. Fakte, poste aperis ech ke ne estas certe ke li estis favora al Esperanto. En la pagho 29 de la "Historio de Esperanto -- 1887-1912", de Z. Adam (Adam Zakrzewski, eld. Pola Esperanto-Asocio, 1979, t.e. represo de eldono de 1913 fare de Gebetner & Wolf, Varsovio), mi trovis paragrafon kiu reghustigas la faktojn. Same en la pagho 43 de la unua volumo de la "Historio de Esperanto -- 1887-1900" de Edmond Privat (eld. Ferdinand Hirth & Sohn, Esperanto-fako, Leipzig, 1923). Jhurnalisto en Nurnberg, pioniro de Esperanto en Germanio, Leopold Einstein (1834-1890) okupighis i.a. pri la demando de internacia lingvo. Li forlasis volapukon kaj tuj strebis por ellerni Esperanton. Jam 8 semajnojn poste, li publikigis broshuron sub la titolo "Lingvo Internacia als beste Lösung des internationalen Weltspracheproblems" (La L.I. kiel plej bona solvo de la problemo de internacia mondlingvo). Tio ja tre similas al tio, kion oni erare atribuas al Albert Einstein !

Tamen estas io tute certa : du jarojn post ricevo de la Nobelpremio pri Fiziko (1921), Albert Einstein (1879-1955) akceptis la honorprezidantecon de la 3-a SAT-Kongreso, kiu havis lokon en Kaselo (Germanio) en 1923. Tio ne estas miriga se oni konas la malestimon kiun Albert Einstein havis por la naciismo : "La naciismo estas infanmalsano. Ghi estas la morbilo de la homaro", kaj se oni scias ke, jam en januaro 1921, la fondintoj de SAT skribis en "Laborista esperantisto" (SAT fondighis en Prago kadre de la UK en aŭgusto 1921) : "Ni deziras krei sennaciecan popolon. Ni volas senprokraste kutimighi al eksternacia pens-, sent- kaj agadkapablo." Saman malestimon li cetere havis por la stato de soldato : "Se homo povas senti ian plezuron paradmashi en vico kaj je la sono de muziko, mi malestimas tiun homon... Li ne meritas homan cerbon char li kontentighas per mjelo." *

- **Opinio de pola diplomato pri Esperanto**

KALINIGRADO. *'La forto de Esperanto estas la forto de la homoj, kiuj kurag'e decidis lerni c'i tiun lingvon kaj sentime komunikig'i per c'i tiu lingvo'*, -- diris Jaroslaw Czubinski, g'enerala konsulo de Pollando en Kaliningrado en intervjuo al c'iumonata revuo 'La Ondo de Esperanto'. Jaroslaw Czubinski, post la pasint-jara sukceso, denove invitas esperantistojn al festa akcepto en la Konsulejo de Pollando kadre de la Zamenhofa Semajnfino, kiu okazos en Kaliningrado 5-7 dec 2003.

RIMARKO : Tiu informo prezentas certan intereson kiam oni komparas la sintenon de tiu pola diplomato kun tiu de la franca ministro de eksterlandaj aferoj, Dominique de Villepin, kiu, dum retado en Irako, parolis en la lingvo de la okupacianto ! Ni imagu kiom "dankemaj" estintus la Francoj se, dum la nazia okupacio, eksterlanda ministro de eksterlandaj aferoj de alia lando estus sin espriminta antaŭ Francoj en la germana, au se dum la rusa superrego super Pollando au aliaj satelitaj landoj, iu diplomato estus parolinta en la rusa...

C'erpitaj de Henri Masson

- **Kial Esperanto estas bezonata por la verduloj?**

Why is Esperanto the Language for the Greens (1984):

- * Because Esperanto is a language designed to spread peace through international understanding.

- * Because Esperanto protects the diversity of regional languages against the excessive use of imperialistic languages.

- * Because (only) by using the neutral language Esperanto we Greens can eliminate discrimination during our own international meetings.

This statement which marks the only difference between AVE and most of the Green Parties is available in several languages.

Many thanks for your attention.

I will send you my application as guest by FAX tomorrow.

Kind Regards , **Manfred Westermayer** (Member of German Greens since the beginning)

- **Martha- virino de Esperanto**

Artikolo publikigita en la j'urnalo DITA (Tago)

La j'urnalo DITA (Tago) en sia numero de unua de septembro 2003 publikigis artikolon-intervjuon de Odise Plaku kun s-ino Martha Otto, membro de la Albana Esperanto-Instituto. Jen la teksto:

Malaltstatura, blondhara kaj omndhara, tre vigla kaj rapida en komunikado, oni renkontas Martha otto-n ofte en la urbo de Fier (suda Albanio) babilante kun homoj je diversa ag'grupoj pri aferoj de la albana vivo. S'i akceptas paroli plezure por la tag'j'urnalo DITA kiun s'I havas jam sian amikinin, aparte por la socia rubriko. Martha estas patrino de kvar plenkresklaj gefiloj, estas naskig'nta en Francio el germanaj gepatroj kaj elmigrinta al USONO ankoraŭ junag'e. S'I estas studinta la anglan, la francan , la germanan, ka hispanan kaj estas dej'orinta kiel intrepertiston kaj instruiston de fremdlingvoj en Eu'ropo, Usono kaj Sudorienta Azio.

Kiel s'i sin trovis en Albanio? La unua vizito s'ia e Albanio okazis e la jaro 1995, kiam s'I partoprenis la balkanan konferencon arang'ita de la Baha'I Komunum de Albanio.

S'in akompanis kamarado kaj s'I renkonis multajn mirindajn homojn c'I tie. S'I revenis al Albanio denove per plej bonaj impresoj decembre 1995 kaj instalig'is au'guste 1996 en la urbo de Vlora, translog'ig'inte el Germanio kie s'I vivis lastan tempon. En Vlora s'I log'as ekde tiam. Kompreneble s'I tavivis la maloportunan jaron por albanoj, la jaron 1997 kiam aparte en Vlora la situacio estis tre alarmiga, per pafpoj kaj teroraj'oj. Nun s'I asertas tre konvinke ke multo s'ang'ig'is je pozitiva direkto, c'u en infrastrukturo, edukado kaj sanprotektado/. Sed ankoraŭ restas ,multo por farig'I, kondic'e ke Albanio transformig'u al vera eu'ropa lando.S';I venis c'I tien kiel volontulo de Baha'I por ke helpu almenaŭ iom por la spirita evoluo de Albanio. Kian konkretan laboron Martha faras c'i tie? S'i diras ke unue s'i amas albanoj kaj volas transdoni al ili la mesag'on de baha'i, dividi ku ili s'iajn sciojn, instrui al ili a fremdlingvojn. Krom la fremdlingvojn, s'I estas studinta akau' la Adlerian psikologion kaj estas akirinta diplomon kiel "Kurag'iga trejnistino". (Encouragement Trainer). La kurag'igo estas modelo por evoluigi la potencialon de personeco kaj solvi la sociajn problemojn. La albanoj suferas multe, pro mankoj en tri kampoj: demokratia edukiteco, socia edukiteco kaj spirita edukiteco. Tial s'I laboras multkte kun virinoj kaj infanoj, instruas al ili la anglan en privata lernejo en Vlora, sed pli multe instruas al ili la kondutmanieron ol la fremdlingvon. Koncerne al Esperanto, s'I diras ke g'in ellernois antaŭ 14 jaroj, c'ar kiel tradukistino kaj interpretistino de fremdlingvoj s'I estas jam koninkita ke la homa bezonas intenacian lingvon, linvon servanta kiel ponton inter la popoloj por plifaciligi la komunikadon studoj, merkaton, vojaĝ'ojn kaj amikecon kun c'iu. Multaj homoj opinias ke la angla farig'is ja mnda lngvo. Fakte la ag;a estas lngvo de aferismo, tamen neniam g'I poas esi lingvo de amikeco.

Kian lokon okupas via agado kiel kredantino de baha'I? Kiel emmbron de Albana Baha'I Komunmo mi havas multajn kontaktojn kun albanoj baha'I kaj ne Baha'i. Ni ofte kunvenas en Peza (vilag'o 20 km apud Tirana) okaze de ia ajn konferenco, ekzemple pri la voirinaj aferoj, pri infanoj au' mi organizas seminariojn pri edukado, sanprotektado, sociaj problemoj en diversaj urboj. Mia plej bona amikino albana log'as en Fier, kie la homoj s'ajnas al mi klerecamaj.

Novaj'oj de Albanio **La Balkana "Nobel-premio"**

La interbalkana beletro komisiono centre en Sofio (Bulgario), estas liverinte lastatempe la Grandan Premion por la beletro de la balkanaj popoloj, "Balkanika 2002". Tiun Balkanan "Nobel-premion" por la jaro 2002 estas gajninta albana verkistino Fatos Kongoli. Li diplomig'is pri matematiko en la jaro 1967, poste instruis dum kelkaj jaroj en la kamparo. Samtempe Fatos verkis novelojn, rakontojn kaj romanojn. La beletro devigis lin rezigni de instruado kaj sin okupi nur per g'i. Rezulte li farig'is tre populara enlande kaj eksterlande. Inter plej konataj verkoj estas: La Drako de Eburo, La felo de la kano, La karuselo, Atendante Nostrodamnuso-n, Similaj maltrankvilaj'oj, Ni triope, La gefianc'uloj, Eu'ropa song'o kun Al Pacino kaj Kavabato, La perdinto, La kadavro, La song'o de Damokleo, Rakontoj. Kelkaj el tiuj c'i verkoj estas jam tradukitaj ankaŭ alilingve. Tiel franclingve haveblas la libroj: La rêve de Damocles; L'ombre de l'butre; Le Dragon d'ivoire; Le paume. Itale haveblas "L'ombra dell'altre", germane "Di albanische Brant" kaj greklingve "Ο χαίρεντος".

B.S.

• La solvita enigmo

La eminenta albana nuntempa verkisto Ismail Kadare estas deklarinta ke la Albana estas unu el 5-6 c'efaj lingvoj de Eu'ropo kaj 12-13 lingvoj de la mondo. Tio veras sed la Albana estas, lau' kelkaj au'toroj, ankoraŭ pli ol aparta lingvofamilia branc'o.

G'i estas rekte deveninta de la Pelazga, ununura biblia lingvo parolita en tuta Romia Imperio. Ekde la tempo de Jezu Kristo, la sola dominantanta lingvo parolata en la tuta Romia Imperio estis la albana. La Latina kaj la Greka, same kiel la Sanskrita estis nur beletraj kaj klerecaj lingvoj. Tion diras la franco Robert d'Angely en siaj kvin verkoj kun komuna titolo "L'Enigme" (La enigmo) kaj volumoj: 1. Les pelasges (La pelazgoj) eldonita en la jaro 1990; 2. Des Thraces et des Illyriens a Homere (De trakoj kaj iliroj al Homero) eldonita en la jaro 1990; 3. Des Etrusques a 'Empire Byzantin (De Etruskoj al la Bizanca Imperio) el la jaro 1991; 4. Les Albanais (La Albanoj) 1991 jaro; 5. Le Secret des Epitaphes (la sekreto de Epitafoj) 1991 jaro.

Pelazgoj instalig'is en spaco komencig'inta en la Itala duoninsulo, pasinte en Balkanion, en Malgrandan Azion kaj finig'inta en la marbordon de Norda Afriko. Kompreneble, kun la tempopaso la pelazga lingvo de tiuj landoj ekdiferencig'is.

Kial oni diras ke la Albana devenas de la Pelazga kaj konservas ties enhavon?

Unue, tion konfirmas la pratempaj grekaj tradicioj, lau' rakontoj de la pratempaj verkistoj ne menciante ties konkludojn.

Due, estas elementoj de la Albana kiu, bons'ance, ankoraŭ parolatas hodiaŭ.

Trie, tion konfirmas la rezultatoj de la arkeologiaj elfosadoj.

Tukidido estas skribinta ke pelazgoj estas ja komunaj antaŭenintoj de iliroj kaj helenoj. Grekio kaj helenoj akiris tiun nomon c'irkau' VII-VIII jarcentoj antaŭ Kristo kaj Homero neniam nomas la landon Helas, kaj helenoj-la soldatojn batalintaj kontraŭ Trojo-n. Helenoj kaj Grekio menciitas unu au' du fojoj de Homero kiel malgranda lando c'erande de la monto Pindo (norda Grekio), karakterizitaj de du ecoj: ili regatis de Akil kaj havis belajn virinojn.

